Esperanto-Informilo

Julio-Aŭgusto 2024

Esperanto Societo Frankfurto

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Nia historio
- Rakontoj
- Diversaĵoj
- Sukcesego
- Lasta paĝo

Foto: U. Fellmann, 18-a junio 2024. „Post prelego pri la kongreso en Strasburgo gemuta kunsido en MÜZ-apuda bierĝardeno“.

Mesaĝo de la prezidanto:

La rezultoj de la eŭropaj balotoj komence de junio kristale klare montras ke je la plimulto de EU-civitanoj ankoraŭ mankas iu ajn eŭropa identeco - alikaze ne eksplikeblas la altaj gajnoj de populistaj kaj naciistaj partioj. Kaj la politikistoj faras ĉiun por malhelpi evoluon de pli kuneca eŭropa unio kaj eŭropa identeco. Ili ja ne volas ke averaĝa civitano simple translokiĝas al alia lando aŭ ŝtato. La lingvobaroj kaj lingva konfuzo estas rimedoj por konservi potencon. Ili scias ke facila komuna lingvo kiel Esperanto estas la bazo por plifortigita unio kaj necesa paŝo por pluevoluigi de eŭropa unio al federacio de eŭropaj ŝtatoj.

Amuzan legadon,
Georg Hennemann, 1-an de julio 2024

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

Bankverbindung / bankkonto:
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag / jarkotizo:
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Unua mardo
La 2-an de julio 2024
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zumo
Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 16. Juli, 2024

18:30 h
Sprachrunde
Übersetzung von Wörtern aus drei verschiedenen Sprachen

Walter Ullmann

-

19:30 h
Vortrag "Aspekte des israelischpalästinensischen Konflikts“

Mardon, la 16-an de julio, 2024

18:30 h
Lingvo Rondo
Traduko de vortoj el tri aliaj lingvoj

-

19:30 h
Prelego „Aspektoj de la Israela-Palestina konflikto“

Anina Stecaj

Kvara mardo
La 23-an de julio, 2024
ekde la 19-a horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

El la klubo

Anoncoj:

- 20.07.24 12:00 — Informstando en la urbocentro, Biebergasse apud Hirthara-Petro-puto (Struwelpeterbrunnen)

Ekskurso kun ŝanĝita dato: 6.7.2024!

- 06.07.24 12:00 — Ekskurso al vulkanurbo Gedern, kun gvidata vizito de la kastelo, Renkontejo: Pizzaria „La Roma“, Otto-Müller-Strasse 20, 63688 Gedern, tablo reservita de 12:00-13:30.
- 07.09.24 12:00 — Migrado apud Heidenrod / Kemel kaj kradrorostado
  Renkontejo: Kradokabano Kemel (Grillplatz Kemel),
  Koordinatojn: Grillplatz Kemer 50°09'39.6"N 8°00'47.4"E
  Pluso-Kodo: 5267+97V, 65321 Heidenrod
  Ekde 12:00pm migrado aŭ veturado de Kemel al Springen kun vizito de la Rozĝardeno en la Aŝramo Bhakti Marga, Am Geisberg 1, 65321 Heidenrod-Springen, Pluso-Kodo: 4XVV+RG Heidenrod

- 05.08. – 15.09.24 — Someraj ferioj de nia kunvenloko Saalbau-MÜZ
- 27.08.24 — Babilada renkonto en la Stattcafé, Grempstraße 21

Niaj reklameventoj en la Rejn-Majna Regiono:

- 18.05.2024 — nuligita
- 15.06.2024 — nuligita
- 20.07.2024 — ESF-Informstando en la urbocentro
- 17.08.2024 — ESF-Informstando en la urbocentro

La ĉioninkluzivpreza pakvojaĝo

Opinia eseo de G. Hennemann

Mi volonte konfesas ke mi ĝis nun neniam en mia vivo faris ĉioninkluzivan pakvojaĝon, krom eble vojaĝojn kaj tendumadon kun skoltoj dum mia juneco. Eble la kialo estis ke mi ĉiam ŝatis mem plani kaj organizi miajn altvalorajn feritagojn. Estis por mi ĉiam granda plezuro kaj antaŭĝojo mem plani la tagojn kaj etapojn de miaj vojaĝoj kaj ne fordoni tiun taskon al profesiaj entreprenoj. Aparte de la fakto, ke ĉioninkluzivaj vojaĝoj ankaŭ havas malbonajn flankefikojn rilate al la medio kaj infrastruktuo en la cellandoj, kiel konata de la amasa turismo, ili ankaŭ ŝtelas de la individuo sian sendependecon kaj memstaran decidkapablon. Sekve dum la ferioj ĉioninkluzivvojaĝistoj ne plu bezonas interagi kun lokaj homoj, ne devas manovri aŭ varii kaj ili eĉ ne plu bezonas pensi. Ili restas en siaj hotelareo aŭ sur luksaj krozŝipoj kun ĉiuj agrablecoj kiujn ili principe havas ankaŭ hejme. Do ne estas miriga, ke tiuj vojaĝoj ne tiom postulas la cerbon kaj la koron kaj ke pakvojaĝistoj ankaŭ dum la ferioj restas en siaj vezikoj kaj paŝo post paŝo demenciĝas. Krome, ĉio-inkluzive ja en multaj kazoj ne signifas ĉio estas inkluzivita, t.e. tute senzorga, sed ĉefe amasa prilaborado de turistoj, banala, sengusta manĝaĵo kaj malbona servo. Do eĉ se la prezoj de ĉioninkluzivpreza vojaĝo sajnas esti malalta, poste ofte sekvas seniluziiĝo.
Sed ne ĉio estas malbona: Esploro montris, ke semajno da ĉio-inkluziva feriado en Dominika Respubliko kontribuas pli al loka malriĉeco-redukto ol trinkado de justkomerca kafo dum 50 jaroj. Do almenaŭ por la malriĉemuloj en la cellandoj la amasa turismo estas bonefika, ĉar ĝi garantiadas laboron kaj salajron.

Foto: Karavano 1912 en egiptio, organizita kaj aranĝita de Thomas Cook.

La fondinto de la firmao Thomas Cook (1808 ĝis 1892) organizis la unuan pakvojaĝon la 17-an de majo 1841 kaj ekde tiam estas konsiderata la inventinto de tiu formo de vojaĝo, kiu daŭre estas tiel populara hodiaŭ.

Ligiloj:
https://www.sueddeutsche.de/reise/interview-am-morgen-urlauber-muessen-nicht-zwischen-geldbeutel-und-gewissen-entscheiden-1.3836812
https://www.welt.de/reise/article115193254/All-inclusive-Urlaub-die-Enttaeuschung-reist-mit.html

Opinio de la korektanto: por persono kiu informis ke ri neniam faris ĉioninkluzivan vojaĝon estas iom aŭdaca aserto, ke oni tie ricevas ĉefe sengustan manĝaĵon kaj malbonan servon.

El la kluba historio

Skanaĵoj el la notlibro volumo 3: (1986 – 2001) el Julio-Aŭgusto 1994



07. 07. 1994

Hans Dornbusch

: Lingva rondo: „Vortoj faritaj nur el afiksoj"
s-ro Ulriko Fellmann

45h: „La 46a Internacia Kongreso de la Fervojistoj Esperantistoj" en Krems/Austrujo
s-ro Walter Ullmann

[illegible] Ullmann

[illegible] Lefaire

Hch. Rabenstein

[illegible]riko Felmano 毛宇理

[illegible]

[illegible]ARLOS ANDRADE

Stecay Hildegard

[illegible]ranziska Reisef.

W. Baumibel

[illegible]orbert Pulver

[illegible]

[illegible]iel Zeiffer

Reinhard Pflüger

[illegible]

04.08.1994
Haus Dornbusch

19h: Lingva rondo: Survoje kiel gasto
s-ro Egon Kiefer
1945: "Esperanta fabelo". Prezentado de memverkita
Esperanta lernolibro de s-ino Ursula Richter

Monika Lafaire
Hch. Rabenstein
Felmano Ulriko 毛宇理
Egon Kiefer
Ursula Richter
[illegible]
Gigi-Harabagiu Sfrancisco (cal) Usono

Gisela Kressel.

Intensaj tagoj kaj eĉ pli strangaj noktoj

Rakonto de Klaŭdja

La varmo estas sufoka. La du turniĝas kaj turniĝas maltrankvile en la lito, inter humidaj littukoj kaj ĝena zumado de kuloj. La klimatizilo ne funkcias. Ĝi mortis dum la vintra ripozo.

"Mi prenos malvarman duŝon"
"Vi nur malŝparos akvon!"
"Ne, mi nur malsekiĝos iomete!"
"Vi jam estas malseka!"

Serĝjo ignoras sian edzinon kaj eniras la duŝon kun subvestoj surmetitaj. Tiel la malseka ŝtofo refreŝigus lin pli longe. Li eliras sur la terason. Li sidiĝas sur la balancilon kaj malfermas la tekkomputilon. Tiu tre grava projekto fariĝis koŝmaro. Serĝjo preskaŭ estas envianta siajn geavojn, kiuj kondukis malfacilan kaj laboregan vivon, sed almenaŭ, post la prizorgado de la kampoj kaj brutoj, ili ne havis pensojn, kaj bone dormis nokte. Li kaj Sara apenaŭ povas dormi. La anomalia varmego (la varmego jam estis anomalia ekde jaroj, sed ĉi jare ankoraŭ pli), la elefantaj kuloj, ĵus hazarde importitaj el Urugvajo, kiuj pikadas ilin malgraŭ la kulvualoj kaj la malavaraj ŝprucoj de insekticido, la streĉa laboro... ili ambaŭ laboras ĉe la sama projekto. Projekto kiu igus tre felicxaj la estroj de la firmao. Ili ricevus komplimentojn, eble monan gratifikon, eble promocion... kiu kunportus novan, eĉ pli streĉan laborŝarĝon. Kaj la vera gajninto, estos nur ilia firmao.

"Mi forlasos mian laboron!" kriegis Serĝjo, revenante en la ĉambron kaj surprizante Sara, kiu responde spirblovas, premegante grandan elefantan moskiton kontraŭ la muron. Tio kaŭzas terurigan makulon sur la freŝe retapizita muro.

Sara ne parolas, sed pensas al ilia situacio: ili dronas en la ŝuldoj.

La sekvan matenon, dum ili rapidas aŭte al la oficejo - feliĉe ili laboras kune, do ili povas ŝpari vojaĝkostojn - Serĝjo komencas paroli denove.

"Mi volas rezigni la postenon!"
"Mi ankaŭ pensis pri tio sed ni ne havas monon. Nun ŝuldojn, ni havas. Ni rajtus hejmlabori. Antaŭ ol ni eksiĝos, ni provu labori hejme. Eble ni povos pli bone koncentrigi, kaj ni havos bonan ideon".
"Sed ni ne restos hejme. Mi volas freŝan aeron".

Sara petas kaj akiras hejmlaboron por ili ambaux. Ili ne volas resti hejme, sed ili ne havas monon: ili ambaŭ estis tute ne ŝparemaj. Do ili translokiĝus al la malnova kabano de la geavoj de Serĝjo dum la sekvaj 10 tagoj.

"Espereble ni havas bonan aliron al interreto!" Serĝjo laŭtvoĉe pensas, malfermante la tempo-eluzitan pordon .
"Ni esperu, ke ni dormos!" diras Sara, kiu pro laceco havas blue kadritajn okulojn.

Ĉio estas polva kaj nuda.
"Ni devas polvigi, bati la matracojn, fari la litojn... kaj kiel ni kuiras? Mi ne scias kiel ŝalti tiun fornon! La legnofornon mi neniam uzis, antaŭe…

La labortago estas perdita, sed ilia fizika laceco estas pli sana ol lia kutima, streĉa laceco.

Ili maltrankvile kuŝas sur la malnovaj matracoj de la malnova knaranta lito, konstruita antaŭ jarcento de avo Luiĝi. Tiutempe tio estis bonega lito, sed nun la lignovermoj multe malfortigis la lignan strukturon. Tuj kiam la lumo estas estingita, forta bruo igas ilin salti en la liton, kiu knaras minace.
Aŭdiĝas timiga sono de miloj da rapidaj paŝetoj, kiuj igas ilian sangon frostiĝi en la vejnoj. Tiam tre ĝena grincado. Malicaj okuloj rigardas ilin en la nokto, reflektante la palajn lunradiojn, kiuj trapenetras la fendojn de la malgranda, malkonektita persieno. La du eĉ ne povas rigardi unu la alian, eĉ ne krii. Du, tri, kvar paroj da okuletoj saltas tra la ĉambro. "Gliroj!" ili murmuras, sopirante la sufoka hejma varmeco, kaj la elefantaj kulegoj. Jes. Ekde multaj jaroj, la gliroj okupiĝis la subtegmenton de la ava domo, kaj ne nur!

Ili ambaŭ, en la malllumo, bedaŭras, ke ili malŝparis siajn abundegajn gajnojn por frenezaj elspezoj, reduktinte sin al malriĉeco, devigitaj atendi la finon de tiun frenezan projekton antaŭ ol povi aĉeti novan klimatizilon.

Afiŝoj kaj afiksoj

Rakonto de Ulriko Felmano

Karaj civitanoj de Gramatikujo!

Mi ĝojas povi deklari la batalojn inter la prefiksoj kaj sufiksoj pace finitaj! Ni formis la novan konkordan komunumon de afiksoj, kiuj inkluzivas kaj la prefiksojn kaj la sufiksojn! Evoluu nun tiu komunumo prospere kaj en paco, por la utilo de la tuta Universala Gramatiko!

Post tiu afabla pacigo, mi proponas nun finon de la batalado inter la prepozicioj kaj la postpozicioj! Ili formu pacan komunumon sub la tegmenta termino de rilatvortoj! Tio ja estas kion ambaŭ faras, esprimi rilatojn inter nomenoj aŭ pronomoj. Ke unuj staras antaŭe, aliaj poste, tio ja ne karakterizas la esencan rolon kion ili havas. Ambaŭ venu do morgaŭ al la Diskutejo por realigi tion postdiskute voĉdone.

Kiam tio estos realigita, mi aŭdacos proponi pacon inter konsonantoj kaj vokaloj, nia eble plej malfacila tasko. Precipe tiklas la postulita tria genro, la duonvokaloj. Tradiciistoj postulas, ke ili ne ekzistas, kaj ke ili fakte estas konsonantoj. La duonvokaloj mem tamen postulas, ke ili estas aparta tria genro, kaj ke ili estu nomataj alproksimantoj, ĉar ili sentas sin ofenditaj per la implicita sugesto, ke ili estas nur iuj "duonaj" estaĵoj. Pro tio ili anoncis manifestacion por la 17-a de junio, kaj kreis por tiu movado novan flagon de inkluziveco. Ni solvu ankaŭ tiun disputon en la spirito de paco!

Gramatikujo, la 28-an de junio,
La Regestro, sia Majestato
Vetrilo Bernengern La Unua

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Georgo):

Du planedoj renkontiĝas.
La unua: - Mi suferas de homo sapiens.
La dua: - La samo ankaŭ okazis al mi, sed tio finiĝos.

La sekva teksto estis sendita al mi rete de la Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, la 21-an de junio 2024:

Granda sukceso por Esperanto en la realo; Zsofia Korody ricevis la Germanujan Federacian Meritkrucon far distriktestro s-ro Marcel Riethig el Göttingen!

Karaj!

Zsofia Korody ricevis pro pli ol dudekjara multflanka elstara laborado por resp. per la neŭtrala paclingo Esperanto en Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo la renoman premion de la Federacia Prezidento s-ro Steinmeier. Tio estas grava paŝo antaŭen por la socia, politika kaj administracia agnosko de Esperanto.

Dum la lastaj jaroj nia ŝtato draste reduktis la disdonkvanton de tiu elstara ordeno, nome nur por personoj kun eksterordinaraj longjaraj sukcesaj - unuavice komunutilaj laboradoj.

La festo okazis la 19an de junio 2024 en la kunsidsalono de la urbodomo de Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo.

La ĉefo de nia distrikto Göttingen laŭtlegis la laŭdacion. Sinjoro Riethig aparte menciis la interkulturajn sukcesojn rilate al Esperanto en nia urbo kaj regiono.

Urbestro Christopher Wagner, ĉeestantaj politikistoj kaj Esperanto-geamikoj elkore gratulis al Zsofia Korody kaj dankis pro la multjara konstanta laborado, por la aktiva engaĝiĝo por la neŭtrala paclingvo Esperanto kaj por Herzberg – la Esperanto-urbo.

Intertempe Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo kun la aktiva Esperanto-Centro atingis grandajn sukcesojn. Tie ekestis unu el la plej grandaj Esperanto-kolektaĵoj kun larĝskalaj Esperanto-fakarkivoj, okazas en la muzeo de la Welf-kastelo konstantaj Esperanto-ekspozicioj kaj troviĝas ampleksa Esperanto-sekcio ankaŭ en la urba biblioteko. La Esperanto-Centro en Herzberg laboradas kiel multkompetenta Esperanto-instituto, ekzemple por kulturo, klerigado kaj informado. Regule ni flegas kontaktojn kun politikistoj, la urba administracio kaj lokaj asocioj.

Zsofia Korody estis kortuŝita kaj dankas al ĉiuj kunstrebantoj, subtenantoj, geamikoj kaj volonte daŭrigos la Esperanto-laborojn.

Ni invitas vin ĉiujn okaze de la 18-a naskiĝtago de Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo al la Esperanto-ĝardenfesto (12.07.2024, 14 h).

Bonvenon, kunfestu!

Kun amikaj kaj samideanaj salutoj,

Peter Zilvar Harald Mantz

Albumo pri la memorinda evento: https://photos.app.goo.gl/hmEquAnkJRbFtjuQ6

Aktuala krominformo:

Karaj klubanoj,

kiel anoncite en la lasta informilo ni renkontiĝos venontan sabaton tagmeze je la 12-a horo en Gedern en la itala restaŭracio/picejo "La Roma", Otto-Müller-Straße 20, 63688 Gedern. Nia tablo estas reservita ekde 12:00 ĝis 13:30. Post la tagmanĝo je la 14-a horo ni kunvenos je la eniro de la apuda kastelo por ĉirkau unŭhora gvidata vizito de la kastelo. Poste ni iras tra la malnova urbo al la kafejo kaj glaciejo "Venecia" en Frankfurter Straße 30 por iomete paŭzi post la rondiro tra la kastelo. Pli poste estos ankoraŭ okazo veturi al apuda lago de Gedern kaj tie iom piediri aŭ viziti la restoracio-kafejo-trinkejo „Seeblick“.

Je la 19-a horo komenciĝos la rok-koncerto je la kastelo kaj ĉiu decidu mem ĉu resti aŭ fuĝi.

Bonvolu respondi aŭ telefonvoki min ĝis ĵaŭdo por anonci vian partoprenon aŭ nepartoprenon por havi superrigadon kiom de ni venos.

La urbo Gedern ne bone atingeblas per publika transporto, do se vi planas vojaĝi per trajno aŭ buso zorgu mem ĝustatempe pri veturkundivido.

Kia vetero estos sabate la 6-an de julio 2024 en Gedern?

En Gedern pluvos matene kun temperaturoj de Ĉ. 17°C. Krome, estos densaj nuboj tagmeze kaj vespere, sed restos seka kun temperaturoj de 17 ĝis 18 °C.

Mi deziras bonan semajnon,

Ĝis baldaŭ, Georg